

SVISA ESPERANTO - SOCIETO


INFORMAS

6/92

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/381 77 13

NOVEMBRO-DECEMBRO



La SVISA ESPERANTO-SOCIETO kaj la redaktoro de SES INFORMAS deziras al ĉiuj legantoj de "SI" belan, edifan kristnaskan feston kaj ĉion bonan, 365 feliĉajn, belajn tagojn en la nova jaro 1993.
-SES kaj "SI"-

La redaktoro de SES INFORMAS precipe dankas al la kunlaborintaj grupoj kaj unuopaj gesamideanoj, kiuj kontribuis al la enhavo de nia informilo.

Sur pli ol 70 paĝoj mi klopodis informi pri diversaj aferoj kaj okazintaĵoj. Laŭ la ricevitaj eĥoj mi konstatas kontentecon kaj tio estas ĝojo por mi.

Esperante, ke ankaŭ en la nova jaro montriĝos bona kunlaboro ĉiuflanke, mi ankoraŭfoje dankas tutkore.
-FL-

* * *

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BASEL: En restoracio Mägd.
26.11.20.00h Monata Kunveno. (Holbein)

Prelego de s-ro H.P. Senn pri:
"Rendevuo kun la fiŝoj en la ruĝa maro"
12.12. Zamenhoffesto

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio "Al Forno" Spitalgasse 37.
3.11.19.30h kaj 1.12.19.30h.

BELLINZONA:

28.-29.11. Antaŭvidata estas kultura semajnfino
esperantista en Lugano, ĉe "Scuola-Circolo
Migros". Temo:

"Esperanto post la okcidentiĝo, kio poste"?

ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:

2.11. Prelego pri: "Al vera homeco".
Parolos s-ro Claude Gacond.

6. aŭ 13.12. Zamenhoffesto en Pully ĉe EMS
(Etablissement Medico Social).

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

4.11.14.00-16.00h paroliga kunveno en resto-
racio "Big Ben" Winkelriedstr.39.

5.11.19.30h en restoracio "Simplon" Habsbur-
gerstrasse 16. "Impresoj pri la 77-a Universala
Kongreso de Esperanto en Vieno". Rakontos
Annelies, Renata kaj Rosa.

26.11. en restoracio "Simplon"

"Gaje trejni nian memorkapablon" kun Renata
Filali.

2.12.1400-1600h paroliga kunveno kun Franz
Brügger, en "Big Ben".

ESPERANTOKLUBO WIL:

En rest. Schweizerhof, Unt.Bahnhofstrasse 18.

4.11.20.00h "Junulara agado en Svislando".
Parolos Vera kaj Dawid Pochanke.

2.12.20.00h "Poezia vespero" omaĝe al la 133-a
datreveno de la naskiĝo de Ludoviko
Zamenhof, kun S. Pochanke.

ESPERANTO-SOCIEZO ZUERICH:

9.11.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse.
14.12.19.00h Jarfina festeto en KARL DER Grosse.
Bonvolu rezervi tiun vesperon por ESZ. Ankaŭ
membroj de aliaj grupoj kaj gastoj estas bon-
venaj. La estraro ĝojus pri multnombra parto-
preno.
11.1.1993 19.00h MK en Karl der Grosse.

S A E F

En la stacidomo LUZERN, en instruĉambro n-ro
210 (2-a etaĝo).

14.11.92. 10.00 ĝis 16.00h

GAJA RONDO DE INSTRUADO

La aranĝo donos al vi la eblecon praktike a-
pliki Esperanton. Ĝi taŭgas kaj por gekomen-
cantoj kaj por geprogresintoj. Vi profitos
de interesa konversacio, neenuigaj ekzercoj,
kaj distra parto.

Ankaŭ neesperantistoj estas afable invitataj
foje "flari" la etoson. -el "SF"-

ANTAUANONCO

La 34-a Internacia Fervoja Esperanto-Ski-
semajno (IFES) okazos de la 16-a ĝis la 23-a
de januaro 1993 sur Hasliberg-Reuti, Svislan-
do. Informojn donas:

Sinjorino Gertrud Eggenberger
Wurmbühlstrasse 10
CH-8405 Winterthur

La 45-a kongreso de IFEF (Internacia Fervo-
ja Esperanto-Federacio) okazos venontjare
en "CERVIA", de la 6-a ĝis la 12-a de junio
1993. Aliĝiloj estas jam je dispono. bonvolu
turni vin al s-ino G.Eggenberger, Winterthur.

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA LA CHAUX-DE-FONDS
SVISLANDO

ESPERANTO-SEMAJNFINOJ EN 1993

Kultura Centro Esperantista ofertas buntan semajnfinan programon por la jaro 1993. Temas pri semajnfinoj (lingvokursoj) por komencantoj, progresantoj kaj lertuloj. La semajnfinaj kursoj okazos ĉiam **la lastan semajnfino de ĉiu monato** kaj strukturiĝas laŭ jena skemo:

Kurso A: por komencantoj (enkonduko en la lingvon Esperanto kun klarigoj pri la Esperanto-movado).

Kurso B: por progresantoj (por partoprenantoj, kiuj jam komencis lerni Esperanton kaj kiuj ŝatus progresi en ĝi; gramatikaj ekzercoj, legado de /facilaj/ tekstoj, konversacietoj).

Kurso C: por lertuloj (por partoprenantoj, kiuj jam bone konas la lingvon Esperanto /kiuj precipe povas sufiĉe bone kompreni ĝin aŭde/. Kutime temas pri kurso, kiu proponas konkretan temon /priesperantan aŭ ne-priesperantan/, en formo de interesa prelego kun aldona diskuto.)

La **kursgvidantoj** estas konataj kaj kompetentaj Esperanto-instruistoj el Svislando kaj eksterlando (Tazio Carlevaro, Tomasz Chmielik, François Degoul, István Ertl, Alain Favre, Claude Gacond, Marion Grosjean, Mireille Grosjean-Robert, Stefano Keller, Ilona Koutny, Andy Künzli, Jean-Jacques Lavanchy, Perla Martinelli, Herbert Mayer, Stefan MacGill, Nicole Margot, Claude Piron, Giorgio Silfer, Blazio Vaha, k.a.) Antaŭvidita estas la engaĝiĝo de aliaj elstaraj personecoj de la Esperanto-movado.

La **datoj** de la semajnfinoj en 1993 estas:
Januaro 30/31; februaro 27/28; marto 27/28; aprilo 24/25; majo 29/30; junio 26/27; julio 24/25; aŭgusto 28/29; septembro

25/26; oktobro 30/31; novembro 27/28; decembro 25/26.

Prezroj: La prezo entenas partoprenon en la aranĝo, tri manĝojn kaj unu tranokton: en 1-lita ĉambro: CHF 120.- (por persono); en 2-lita ĉambro: CHF 99.- (por persono); en 4-lita ĉambro: CHF 89.- (por persono); nur programo kaj manĝoj, sen tranoktoj: CHF 80.-

La detalan programon oni povas mendi skribante aŭ telefonante al: Kultura Centro Esperantista, CP 779, CH-2300 La Chaux-de-Fonds. Tel. /41/ 039 26 74 07.

ooOoo

VOKO EL ZAIRIO

Mi lernas Esperanton kun miaj samideanoj. Kune kun ili ni kreis nian Esperantogrupon. Tiuĉi enhavas lernantojn kaj profesorojn de nia liceo. Ĝi celas la plialtigon de la scio-nivelo de la esperanta lingvo.

Mi mem estas profesoro de geografio. Mi ŝatas esprimi mian deziron por korespondado kun samideano el Svislando.

Ĉu mi rajtas esperi, ke iu povus plenumi mian deziron? Jen mia adreso:

Nsimba Tezo Leopold
c/o Abbé Mayala Benoît,
Lukala, B.P. 7898, Kinshasa (Zaire)

MORTANONCO

La 2-an de aŭgusto 1992 (post reveno de la UK en Vieno) tute neatendite mortis s-ino Heidy Grimm, membro de la Lucerna Esperanto-Societo kaj Svisa Esperanto-Societo. Al s-ro Grimm ambaŭ societoj tutkore kondolencas. Heidy Grimm restos ĉe la geesperantistoj en amika memoro.

ooOoo

SVISA RADIO INTERNACIA (SRI)

Ĝenerala informo:

Ni scias, ke SVISA RADIO INTERNACIA forigis la Esperanto-Elsendojn el la programo. La aŭskultintoj de tiuj elsendoj ege bedaŭras tiun paŝon kaj demandas sin, kio do povas esti la vera kaŭzo?

La redaktoro de "SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS" diskutis plurfoje tiun-ĉi temon. Estas vere domaĝe, ke post tiom da jaroj oni tiel subite kaj abrupte agis. Kion ni povus fari? Kiel ni povus kontribui?

Sendube estus grave, se kiel eble plej multe da gesamideanoj ekagus kaj skribus al SRI, esprimante sian bedaŭron pri la malapero de la Esperanto-Elsendoj. (Adreso: Svisa Radio Internacia, Esperantofako, CH-3000 Bern 15).

Ni ja scias, ke la parolintoj en, kaj gvidintoj de la SRI-elsendoj faris sian plej eblon, prezenti altkvalitajn kaj kulture tre valorajn programojn.

La redaktoro de "SES INFORMAS" permesas al si tute serioze apelacii al la instancoj de SRI, esprimante la deziron, ke la respondecaj personoj bonvolu ankoraŭfoje esplori kaj pripensi la refunkciigon de la Esperanto-Elsendoj en la SRI-programo. Ni bone konscias pri la severaj ŝpar-agadoj ĉie, sed ni ne povas kompreni, ke ĝuste la internacia lingvo Esperanto devas esti la viktimo, precipe en momento, kiam oni tutmonde sentegas la grandajn malfacilaĵojn de bona reciproka kompreniĝo. Eble iom da redukto estus estinta pli bone komprenebla paŝo. Se oni rigardas la grandan nombron da lingvoj, en kiuj SRI elsendis kaj ankoraŭ elsendas, montriĝas absoluta ebleco ĉe ĉiuj iomete fari redukton, sed ne plene forigi programon, kiu estis aŭskultata en ĉiuj kontinentoj.

La leteron al SRI legu apude.

-FL-

ALDONA LETERO POR SVISA RADIO INTERNACIA
ESPERANTO-FAKO

Tre estimataj Sinjoroj Direktoro kaj plej proksimaj kunlaborantoj,

Mi submetas al vi la sinceran peton, ankoraŭfoje pripensi la apude cititan aferon. Ni ne dubas, ke ankaŭ vi venos al la vidpunkto, ke nia prezentita afero enhavas diskutindan kernon. Ni ne intencas malfavorigi iun ajn lingvon, sed ni opinias, ke ioma redukto ĉe ĉiuj ne necesus plene forigi ŝatatan programon, nome la Esperanto-Elsendojn.

Ni sincere esperas pri pozitiva reago de via flanko kaj ni samtempe certigas vin, ke per tia paŝo vi denove ne nur kontentigus, sed eĉ ĝojigus la grandan aŭskultantaron de la menciitaj elsendoj.

Oni ne rajtas forgesi, ke por nia lando estas tre bona reputacio, apud la multaj lingvoj, ankaŭ disaŭdigi en la internacia Lingvo

ESPERANTO.

Kun altestima respekto
la redaktoro de

"SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS"

EHOJ EL LA UK EN VIENO

RADIO-REZOLUCIO

Reprezentantoj de diversaj radio-stacioj utiligantaj Esperanton kaj aŭskultantoj de tiuj stacioj, kunsidantoj dum la 77-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno, 24-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto.

- diskutinte la aktualan situacion de la esperanto-programoj kadre de kurtondaj radiostacioj:

- konstatinte, ke pluraj radiostacioj, precipe Pola Radio (Varsovio), Svisa Radio internacia (Berno), Radio Zagrebo (Kroatio) draste reduktis aŭ eĉ ĉesigis sian Esperanto-programon:

- forte bedaŭras la decidon de la estraroj de la supre menciitaj radiostacioj:

- opinias, ke Esperanto-elsendoj daŭre estas alloga kaj grava rimedo por la internacia komunikado, precipe en la nuntempo, kiam oni alstrebas la kreon de nova internacia ordo:

- estas konvinkitaj, ke Esperanto estas vaste ŝatata lingvo por informi la internacian publikon pri la eventoj en la koncernaj landoj:

- emfazas la fakton, ke ĉefe en orienta Eŭropo daŭre estas forta deziro ricevi objektivan informadon el aliaj mondopartoj, kiun garantias la Esperanto-lingvo:

- petas la supre menciitajn radiostaciojn revizii sian decidon kaj reenkonduki Esperanton.

- rekomendas al nove sendependiĝintaj ŝtatoj utiligi Esperanton pere de la propraj radiostacioj.

Raporto:

PRI LA 77-A UNIVERSALA KONGRESO EN VIENO (AUSTRIO)

Bravaj organizantoj malgraŭ defioj

Konsiderante la cirkonstancon, ke la ĉijara UK de UEA (25 julio - 1 aŭgusto 1992) parte similis al improvizaĵo, kio en la realeco preskaŭ ne estis rimarkebla, oni devas konfesi kaj admiri, ke ĝi ĝenerale pasis glate samkiel ajna averaĝa UK. Post kiam oni sufiĉe malfrue eksciis, ke Prago forfalas kiel kongresurbo, la organize eble plej taŭgaj aŭstraj esperantistoj, ĝuante la kompetentan reĝisoradon el la kongressperta CO rotterdama, starigis tiun ĉi kongreson en Vieno.

Ne ĉiam kontentiga programo, sed abundaj interhomaj kontaktoj

Imponis kelkaj aspektoj de la ĉijara UK, aliaj estis seniluziigaj (precipe diversaj vesperaj programeroj). La kongresejo (renomata Aŭstria Centro Vieno), kiu cetere kostis al UEA nekutime altan luprezon, pro sia grandeco ja denove estis sperto kvazaŭ labirinteca; ĝi tamen ĝenerale plaĉis pro sia relativa moderneco, precipe ĝia salonego, kiun la kongresanoj tradicie nomas 'Zamenhof', kaj ĝia praktika bufedo en la enirhalo. Malgraŭ mia propra okupiteco dum la kongreso (mi reprezentis parte SES, KCE, CDELI, SRI, TEJO per prelego, disdono de informiloj, ĉeesto en oficialaĵoj aŭ simile) - ho ve! kiel agrable estus foje partopreni kiel simpla, malfunkciula kongresano - mi sukcesis ĉeesti kelkajn tradiciajn kongresajn programerojn. Kiel kutime, kelkaj allogas, aliaj gravas, sed ne allogas, pliajn entute ne indas partopreni. En momentoj, kiam oni serĉis pli interesan okupon, oni prefere miksis sin inter la ĉebufede kafumantaj aŭ lunĉantaj kongresanoj kaj elektis sian diskutopartneron - ĉe pli ol 3000 homoj el 69 landoj tio ne estis granda problemo. Kiel forta konkuranto de la klimatizita kongresejo por amikaj kunestadoj intersamideanaj tuj evidentiĝis ankaŭ la ĉarma malnova parto de la aŭstra ĉefurbo, kvankam la surstrata varmego estis apenaŭ eltenebla.

Svisaj kongresanoj

Inter la kvardeko da svisaj kongresanoj kelkaj havis eĉ tre aktivan funkcion: Nicole Margot, Alain Favre kaj Andy Künzli dum la tuta semajno gardis la KCE-budon, varbante por la esperanto-centro en La Chaux-de-Fonds kaj disdonante milon da informiloj; kiel svisa A-komitato Didi Weidmann observis (mem ĉeestante nur parte) la evoluon en la komitato de UEA; Niklaus Weiss kontaktis homojn ankaŭ el sia 'strategio' de ĉefdelegito de UEA por Svislando. Kelkaj svisoj ankaŭ partoprenis la tradician akcepton en la viena urbodomo. Krom tio estis ankaŭ okazo konatiĝi kun 'novaj homoj' de nia svisa movado, kiuj anoncis sin pretaj pli firme kunlabori kaj eĉ, laŭ la sugesto de la SES-estraro, transpreni taskojn, kiuj dum jaroj ne estis sufiĉe kontentige plenumitaj de aliaj funkciuloj.

Entute, kvankam el programa vidpunkto ne ĉiam plene satiga, la Universala Kongreso kutime estas perfekta forumo por renkonti malnovajn konatulojn kaj elstarajn aktivulojn de nia movado. Preskaŭ proverbe: ĉe bier- aŭ kafotablo solviĝas multaj demandoj. Kvankam ne ĉiam havante sufiĉajn okazojn por tio, mi persone ege ĝuis tiun kongreson precipe el tiu flanko.

La venontjara UK okazos en Valencio (Hispanio). Do, ĝis tiam! Informoj riceveblas ĉe UEA aŭ SES.

Andy E. Künzli

ooOoo

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

G r a v a p a r t o d e E s p e r a n t u j o

Venu

esperantiĝi - progresi - esperantumi - kongresi
rigardu nian riĉan programon! Postulu ĝin tuj.

PF 779 CH-2301 La Chaux-de-Fonds tel 039/27 74 07.

ooOoo

INTERESA REZULTO POST NACILINGVA ENKETA VARBADO

En julio 1992 Svisa Esperanto-Societo realigis nekutiman varbadon kun enketa karaktero. Al **1194 adresoj** (memorfiksitaĵoj en la komputilo de SES/KCE) estis sendita **unupaĝa letero** (en la germana aŭ franca aŭ itala lingvo laŭ lingvoregiono), kiu portis **slipeton** kun kelkaj demandoj. Oni estis petita respondi (ĝis la unua de septembro 1992), ĉu oni daŭre interesiĝas pri esperanto, ĉu oni ŝatus ricevi informojn pri esperanto (ĝenerale, pri SES aŭ KCE), ĉu oni ŝatus fariĝi membro de SES aŭ aboni ties gazetojn, ĉu oni ŝatus subvencii la poresperantan agadon en Svislando. Krom tio estis alineo "Mi ne plu interesiĝas pri esperanto, bv. streki mian adreson el via adreso" (en kazo de nerespondo SES konsideris la nereaginton aŭtomate forstrekota el la adresaro). La koncernan kazon oni povis indiki per krucosigno.

Per tiu agado SES volis a) 'purigi' sian malnovan adresaron de superfluaĵoj kolektitaj dum jaroj aŭ eĉ jardekoj (iamaj informpetoj, libromendintoj, kurslernintoj, ktp.); b) rememorigi pli ol mil homojn en tuta Svislando, ke esperanto daŭre ekzistas kaj inviti ilin reinteresiĝi pri niaj internaciaj lingvo kaj movado.

Kvankam tiaspecaj enketoj ne ĉiam estas tro fruktodonaĵoj, ĉifoje SES povis konstati relative **surprizan kaj ĝojigan rezulton**. Jen la koncernaj ciferoj:

De 1194 personoj

118	petis forstreki la adreson;
48	deziras ricevi informojn pri esperanto;
71	deziras ricevi informojn kaj samtempe fariĝi membro de SES, aboni ties gazetojn aŭ alimaniere subvencii la agadon de SES aŭ KCE;
17	reagis diversmaniere (kelkaj resendintoj skribis afablajn leterojn kaj donacis malgrandajn sumojn por fariĝi membro, abonanto aŭ apoganto);
46	resenditaj kovertoj de la poŝto (nekonataj adresoj, forvojaĝintoj, mortintoj, ktp.).

Do, ekzakte 300 el 1194 personoj entute reagis, kiel atendite

la plimulto, nome 894, ne resendis sian slipon.
Per tiu agado ni esperas, ke SES ekhavas novajn memb-
rojn/abonantojn aŭ eble ankaŭ novajn aktivulojn en estonteco.

En dua paŝo, SES sendis al la respondintoj, kiuj volas daŭre
resti en kontakto kun esperanto, leteron, kaj konfirmis ilian
krucosignitan deziron en la enketo. Tiuj adresoj estos aparte
konservendaj en nia komputilo.

Andy E. Künzli, gvidanto de la enketo
Mireille Grosjean-Robert kaj d-ro Tazio Carlevaro,
kunlaborintoj (tekstotradukintoj).

ooOoo

AUSKULTANTOJ DE RADIO VIENO

renkontiĝis en la UK en Vieno, sub la gvido
de sinjoro Vakal, por pridiskuti la nunan
kaj estontan kunlaboradon. Multaj el la ge-
partoprenantoj substrekis la gravan rolon
de la Esperanto-Elsendoj de Radio Vieno en
la informado pri Aŭstrio. Preskaŭ ĉiuj pro-
mesis, post la reveno hejmen, sendi siajn
impresojn pri la kongreso kaj pri Vieno, al
la adreso: Viena Radio-Esperantofako, A-1136
Wien. Post la kunveno oni distribuis dona-
cetojn de Radio Vieno al la gekongresanoj.
En la kongreso estis 3033 gepartoprenantoj el 69
landoj.

ooOoo

PROVIZORA REZULTO DE LA PROJEKTO 'LEKSIKONO PRI SVISAJ ESPERANTISTOJ'

Kolekti biografiojn

En julio 1992 **352 esperantistoj de Svislando** ricevis de Andy Künzli leteron kun klarigoj pri la projekto 'Leksikono pri (aktivaj) svisaj esperantistoj'. La celo de tiu entrepreno estas **kolekti biografiojn kaj kompili biogramojn** (= koncizajn vivoportretojn) pri svisaj esperantistoj. Aldone al la klariga letero ili trovis enketilon kun la peto libervole respondi al 32 demandoj (ili koncernis ĉefe la profesion vivon kaj la poresperantan aktivecon de la gesamideanoj) ĝis la 1-a de oktobro 1992. La rezulto de tiu laboro estus post 2-3 jaroj **libroforme publikigi biogramojn** pri mortintaj kaj nuntempaj svisaj esperantistoj laŭ la modelo de la (ne tre konata) libro 'Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj'. Kroma celo havas ankaŭ **sociologian fonon**: Pere de la biografioj mi ŝatus studi la personecojn de la e-istoj (pri kio ili profesie kaj hodie okupiĝis/as, interesiĝis/as, kiel/kial ili iĝis e-istoj, ktp.). Verŝajne oni larĝigos la entreprenon al **Svisa Esperanto-Leksikono**, kiu ankaŭ alportos historiajn priskribojn pri la unuopaj elementoj de la esperanto-movado en Svislando (historio de SES, KCE, unuopaj kluboj, ktp.)

Entuziasmo kaj skeptiko

Al multaj plaĉis la ideo de la projekto, kelkaj reagis skeptike aŭ negative aŭ miskomprenis la aferon. Kiel atendeble, relative granda parto de enketotoj, pro diversaj kialoj, bedaŭrinde ankoraŭ ne reagis (kompreneble eblas resendi la plenigitan enketilon ankaŭ **post** la unua limdato (1-a de oktobro 1992)). Ĝis nun mi sukcesis kompili **180 biogramojn** (pri forpasintaj kaj nuntempaj e-istoj). Sendube, ĝis la fino de la jaro mi celas almenaŭ 200 biogramojn. Kaj estus granda sukceso, se la nombro altiĝus al 300 en la unua duono de 1993. Estas tre malfacile taksati entute la nombron de esperantistoj en la historio de la esperanto-movado en Svislando; jam nun estas

certe, ke pri multaj fruaj gesamideanoj ni nur malfacile aŭ tute ne plu povos akiri sciigojn.

Sukceso de la entrepreno bezonas kunlaboron de ĉiuj

Kompreneble, la ambicio de tia leksikono estus ĝia **maksimuma kompleteco**. Por atingi ĝin nepre necesas la bonvolo kaj konsento de seeble ĉiuj alparolitoj. La ĝisnuna laboro montris, ke malantaŭ niaj gesamideanoj ofte kaŝiĝas **ege interesaj homoj**, eĉ se ili ne estas aŭ ne ĉiam estis aktivaj esperantistoj, aŭ gravuloj de nia movado. Nia leksikono (aŭ enciklopedio, se vi preferas) **konigu la membrojn** de nia esperanto-komunumo, ne nur al 'ekstera' publiko, sed ankaŭ al la e-istoj mem. Estas vere, ke ili konas unu la aliajn tro malbone. Tia leksikono povus esti **signifa kontribuo al la historio de esperanto** en Svislando. Kiu hodiaŭ ekzemple ankoraŭ memoras, ke iam ekzistis Esperanto-grupo en Herisau, Zug aŭ Vevey. Kiu inter la pli junaj gesamideanoj scias, ke ekzistis esperanto-skiferioj en Adelboden, esperanto-kursoj en Münchenwiler, Ekzamena komisiono de SES, la komisiono 'Esperanto lernejen' aŭ sukcesa esperanto-ekspozicio en la nacia biblioteko en Berno en 1953. Kiu scias, kiu estis ekzemple Alfred Bader, Rinaldo Borsa, August Braun, Charles Ecabert, Hanni Fischer-Buri, Hans Jakob aŭ Siegfried Spielmann - jen nur kelkaj el eksterordinaraj homoj kun neforgesindaj meritoj. Kiu vere povas imagi, kiom multflanka personeco estis ekzemple Edmond Privat. Kiu povas rakonti pri la ĝeneva UEA-periodo kaj ties aktivuloj. Kiu ankaŭ vere scias, kiuj homoj estas ekzemple la hodiaŭaj gvidantoj de la svisa esperanto-movado? Respondojn al tiuj kaj multaj aliaj demandoj oni povus trovi en tia leksikono. Mi volas akcenti, ke la leksikono ne celas konsideri nur moŝtulojn, sed ankaŭ 'simplajn' esperantistojn, personojn, kiuj estas (eĉ iamaj) membroj de iu esperanto-societo (ĉu kun aŭ sen funkcioj). Iam estos malfacile postĉasi la biografiajn sciigojn, necesas postlasi ilin nun.

Helpu krei la leksikonon

Mi scias, ke la realigo de la ĉi tie prezentita projekto signifos **grandan laboron kaj kunlaboron**. Mi konscias ankaŭ, ke plenigi la dissenditan plurpaĝan enket-foliaron ŝtelos de vi, karaj gesamideanoj, iom da tempo. Mi tre ĝojus, se multaj povus konsenti pri kunlaboro disponigante al mi la petitajn biografiajn sciigojn pri si mem aŭ seeble ankaŭ pri aliaj, antaŭ ĉio ne plu vivantaj gesamideanoj, kiujn vi konis. La enketo estas konfidenca. La CK de SES apogas la ideon. Ne hezitu sendi al mi vian propran 'Curriculum vitae' kaj ne forgesu rakonti pri via esperantista vivo (kiam, kie kaj kiel vi iĝis esperantisto, kiujn funkciojn vi havis en kiuj organizaĵoj, kies membro vi estis, ktp.). Estus tre domaĝe, se valoraj biografiaj informoj perdiĝus kaj se iam ni devus laŭ komplika vojo akiri ilin. Car tutcerte, pli frue aŭ pli poste iu denove okupiĝas pri biografioj, ĉar ĝi estas daŭre aktuala temo, eĉ se kutime dum longa tempo neglektata. Bonvolu kompreni la 'leksikonan projekton' ne unuavice el propaganda vidpunkto, sed el **historiografia neceso kaj utilo**.

Se ni gajnos la konsenton de la plimulto de niaj gesamideanoj, ni espereble povos eldoni la libron pli frue ol antaŭvidite.

Sojle al la **dua jarcento de Svisa Esperanto-Societo (100-jarigo en 2003)** do povus aperi nova grava libro en svisa Esperantio.

Grave: ĉiuj resendantoj de la enketilo ricevos la kompilitan presprovaĵon antaŭ publikigo por kontrolo.

Petu la enketilon ĉe la suba adreso, se vi bezonos ĝin; en kazo de demandoj skribu aŭ telefonu al la redaktoro de la 'Leksikono'.

Kun espero kaj antaŭdanko
La redaktoro de la 'Leksikono':

Andy Künzli, Zumhofstrasse 22, 6010 Kriens (LU). Tel. (041) 45 55 83.

V E N O N A N T A J E S - R E N K O N T I Ĝ O

De la 7-a ĝis la 8-a de novembro 1992 en la Chaux-de-Fonds.

Programo: * ludoj, babiladoj, ridoj...
* ĝenerala asembleo (sabate je la 15.00h
* kampara migrado kun fajra tagmanĝo.

Alveno: Ni atendos vin ekde la 13-a sabate en Kultura Centro Esperantista, strato Postiers 27. Sekvu la indikilojn KCE aŭ prenu buson n-ron1 RECORNE ĝis la haltejo "Esperanto".

Tagordo de la ĝenerala asembleo:

1. Malfermo
2. Aprobo de la jarraporto
3. Aprobo der la jaraj kontoj
4. Malŝarĝo de la komitato
5. Modifo de la statutoj
6. Bulteno
7. Renkontiĝoj
8. Propagando
9. Eksteraj rilatoj (koncize)
10. Fikso de la jaraj kotizoj
11. Buĝeto
12. Elekto de la komitato
13. Proponoj (ili atingu la komitaton ĝis la 1.11.92.)
14. Diversaĵoj

Atentu: Ne forgesu vian membrokarton, ĉar nur per ĝi vi povos voĉdoni dum la asembleo! Ankaŭ kunportu viajn kuponojn, ĉar eblos aĉeti librojn aŭ kasedojn.

Prezo: Fr.25.- Tio inkluzivas manĝojn, loĝadon kaj ekskurson. JES-kuponoj validas.

Aliĝ-limo estas la 1-a de novembro. Validas la dato de via pago al PK 80-29282-8. Se vi malaliĝas ĝis la 5.11. vi rericevos la plenan sumon.

Aliĝilon bonvolu sendi al

J E S, Poŝtfako 779, 2301 La Chaux-de-Fonds.

Svisa Esperanto-Leksikono:
Komentita prezento de kelkaj specimenaj biogramoj pri
svisaj esperantistoj

Pro kialoj de konfidenco, kiun proklamis la redaktoro de la planita 'Leksikono pri svisaj esperantistoj' lanĉante la enketon al la gesamideanoj en Svislando, estas prezentitaj ĉi sube nur biogramoj de forpasintaj gesamideanoj. Al tiuj biografioj iam aldoniĝos biogramoj de nuntempaj esperantistoj. La sekva mallonga prezento celas montri esencon, stilon kaj kelkajn problemojn de la kompilado de biogramoj.

La 'Leksikono intencas inkluzivi kaj esperantistojn kun signifaj agadoj, kaj 'simplajn' gesamideanojn, kiuj ne havis gravajn postenojn, sed meritojn kiel fidelaj membroj de esperanto-organizaĵoj. La enhavo de la biogramoj koncentriĝu unuavice pri ilia privata, profesia vivo kaj pri ilia sindediĉo kiel esperantisto. Ekzemplo por tiaj esperantistoj estas s-roj **Gottlieb STÄHELI** (+ 1941) kaj **César AMAUDRUZ** (+ 1975), pri kiuj 'Svisa Espero' kaj 'Svisa Esperanto-Revuo' skribis jenon:

STÄHELI Gottlieb

Nask. 1879, mort. 1941.
Grandparte dank' al lia kontribuo povis siatempe esti fondita E-grupo Romanshorn (TG).
(SE 2/41)

AMAUDRUZ César

Nask. 1893, mort. 1975. RS. E-isto ekde 1944, ofte partoprenis kunvenojn k kongresojn k estis hon. membro de Laborista Grupo Lausanne.
(SER feb 76)

Tamen, mi ŝatus scii pli multe pri tiuj ĉi estimataj samideanoj. Kiu povus helpi ?

Alia interesa ekzemplo estas la biografio de d-ro **Alfred BADER** (+ 1968). Lian biogramon mi kompilis surbaze de la nekrologoj en la svisa esperanto-gazetaro kaj precipe de lia propra aŭtobiografia verketo 'Esperantisto dum 60 jaroj', kiun afable havigis al mi leksikone kunlaborema esperantistino:

BADER Alfred

Nask. 1889 en Basel, mortis 1968 samloke. AS. Studis medicinon en U Basel, d-ro. Dum la 1a MM du jarojn helpis en lazaretoj en Würzburg (D). Ekde 1918 en Schaffhausen praktikis okulkuracadon en

privata kliniko. 1929 revenis al Basel. Artkonanto k amikomeceno por artistoj. Edzo k patro de tri infanoj. Lernis E en 1904 kiel gimnaziano post prelego de /v/ F. Schneeberger jun. en Basel. Car Schneeberger estis ankaŭ

elstara stenografiisto, kune kun /v/ F. Wenk k aliaj B. fondis int. stenografian societon k iĝis membroj de ĝia CK. Samjare B. fondis E-klubon Basel k 1905 starigis kun Wenk E-grupon Basel, kiun li longe prezidis. Konscie travivis la Ido-krizon, kiun li rezistis. Korespondis kun L.L. Zamenhof k kun multaj aliaj gesamideanoj en la tuta mondo k gajnis plurajn verajn E-amikojn. Kunlaboris kun 'La Revuo', kie aperis liaj noveloj de Mela Escherich k Theodor Storm. 1906/07 e-igis la romanon 'Immenlago' de Storm. 1908 proprakoste eldonis sian tradukon 'Ĉe la sanktaj akvoj' de J.C. Heer (la laboron li finis en ferioj en Estayerle-Lac). La 1a MM k la profesia okupigo en Schaffhausen

ĝis ĉ. 1929 lamigis lian E-aktivecon. Partopreninte la SES-jarkunvenon en La Neuveville (BE) B. reentuziasmiĝis k rekomencis traduklaboron. Dank' al B. SES povis aperigi 1945 la broŝurojn 'Pensoj de Zamenhof' k 1947 'Du amasantaj noveloj' (kiuj entenas 'Imenlago' de Storm k 'Maruška de Escherich. Ankaŭ ĉina eldonejo publikigis 'Imenlago'). 1950 verkis la originalan poemon 'La plezurego'.

1967 B. verkis 10-paĝan aŭtobiografian tekston kun la titolo 'E-isto dum 60 jaroj', kiun SES multobligita aperigis post lia morto. Hon. membro de SES.

(SE majo-jun 68, SER dec. 81)
(EeP; Bader, Dum 60 jaroj e-isto, 1968).

Intertempe vi konstatis, ke la biogramoj aplikos sistemon de mallongigoj. Ekz.: AS = alemana sviss/in/o, RS = romanda sviss/in/o, BL = bazlernejo, SL = sekundara lernejo, KL = komerca lernejo, G = gimnazio, U = universitato, prez. = prezidanto, sekr. = sekretario, /v/ = vidu, MM = mondmilito, k = kaj..

Tre entuziasma samideano hodiaŭ apenaŭ konata estis s-ro **Charles ECABERT** (+ 1962). Lia esperantisteco daŭris nur tri jarojn. La movado perdis en 1962 krom Edmond Privat ankaŭ alian promesplenan samideanon. Konvinkiĝu mem:

ECABERT Charles

Nask. 1913 en la berna Ĵuraso, mort. 1962 pro akcidento. 1938 licenciigis pri teologio, sed tuj eniris la instruistan karieron, kiu kondukis lin al Bruxelles (B), Lugano (TI), Schwyz, La Chaux-de-Fonds, Cernier (NE) k 1956 al Neuchâtel. Instruisto en 'Collège latin' k supera KL en Neuchâtel de la latina, greka, franca k.a. lingvoj. E-iĝis nur en 1959 post kontakto kun /v/ C. Gacond, kiu organizis la manifestacion 'E lernejen' en la G Neuchâtel. En mallonga tempo ellernis E, kiun li nomis 'simpla latino', k faris relative rapidan karieron estante e-isto nur

dum tri jaroj: 1961 prez. de SES, preleganto dum aŭtuna manifestacio en La Sagne (NE), Herzberg (AG) k Münchenwiler (BE), 1962 red. de 'Svisa Espero' k E-parolanto ĉe SRI laŭ propono de E. Privat; prez. de E-edukistaro de CH. E. estis kvazaŭ E-stelo subite falinta de la ĉielo, sed lia kunlaboro estis tre fruktodona nelaste pro konvinka defendo de la homarana idealo k de la deziro, ke E iam ludos apartan rolon por faciligi la lerneajn programojn k havigi al pli vastaj tavoloj de geknaboj la profiton de klasika kulturo. (SE feb 63, dec 63, foto SER nov. 72, foto SE junio 62)

La unua prezidanto de SES nomiĝis **E. FAILLETAZ**. Kaj al la tiama Centra Komitato apartenis ankaŭ **J. FEIERABEND**: Pri ili ni posedas nur tre modestajn sciojn. Kiu povus helpi kompletigi la biogramojn ?

FAILLETAZ E.

El Lausanne. Unua prez. de SES 1903/04.
(SER okt. 78)

FEIERABEND J.

el Bern. AS. 1903 apartenis al la CK de SES (kasisto; provizora prez. 1904. Fondis E-grupon Bern en 1906.
(SER nov. 81, ok. 78)

Unu el la nekutimaj virinoj de la svisa esperanto-movado estis **Hanni FISCHER-BURI**. Ĉu iu povus informi min, kie ŝi naskiĝis kaj eble rakonti pli multe pri tiu interesa figuro ?

FISCHER-BURI Hanni

Nask. 1894, mort. 1961 en Bern. AS. Lernis E okaze de la UK Bern 1939, apartenis al la LKK de la UK Bern 1947. Partoprenis plurajn aliajn UK. Kun sia edzo estris la hotelon-restoracion 'Metropol' en Bern, kiu iĝis centro de la e-istoj en Bern. Post akiro de la supera diplomo de SES en la 50aj jaroj, F. ekinstruis la lingvon k interesis multajn elstarajn personojn pri E, i.a. /v/ prof. A. Bohren. Enkondukis E en la instruplanon de la popola altlernejo

Bern. Anino de la CK de SES en diversaj funkcioj; hon. membrino de SES. Kiam F. retiris sin de la hotelista profesio, fondis 1955 la 'Svisan E-Instituton', kiu iĝis valora informejo por la movado k per kiu estis tenitaj valoraj kontaktoj kun politikistoj, ekz. dum la Unesko-kampanjo. Post ŝia morto la instituto ne estis daŭrigata. Kune kun /v/ W. Perrenoud, F. kreis ankaŭ la fundamenton por la ferio-kursoj en Münchenwiler (BE), kies sekretariino ŝi estis.
(SE okt 61, SER dec. 81)

Kiu konis s-rojn **Jules FREYMOND** kaj **Henriko FRIDÖRI** kaj s-inon **Alice FRÜH** kaj povus liveri pli da donitaĵoj ?

FREYMOND Jules

Nask. 1888, mort. 1978, el Lausanne. RS. Unu el la plej malnovaj svisaj e-istoj, kiu ĝis sia lasta vivojaro vigle aktivis, ĉefe en fervojistaj rondoj, nelacigebla vojaĝanto.
(SER apr. 78)

FRIDÖRI Henriko

Mort. 1928. E-isto de 1906. AS. Laboris por E precipe inter instruistoj. Prez. de E-grupo Zürich, ano de la Ekzamena komitato k Lingva Komitato. 1912 adaptis al E la instrumentodon de G. Egli (Orelli Füssli) k kunlaboris kun 'E-o' k 'Svisa Espero'. (1933)
(Enc. SER majoj 1981)

FRÜH Alice

Nask. ?, mort. 1985, el St. Gallen. AS. En siaj junaj jaroj ŝi estis tre aktiva e-istiĝo kun bona lingvoscio. Ŝi ankaŭ kunlaboris en la Svisa

Antologio. En la postaj jaroj ŝiaj kontaktoj kun la E-medio maloftiĝis.
(SER Okt. 85)

Kaj fine pri s-ro **Edouard WALDVOGEL**. La sekvan biogramon mi verkis surbaze de liaj aŭtobiografiaj rakontoj 'Memoraĵoj de Veterano' aperintaj en 'Svisa Espero' 1969/70. Li naskiĝis ĉ. en 1892/93. Do, nun li estus 100-jara. Neniu kantona (Neuchâtel) aŭ svisa oficiala informejo povis plu trovi tiun estimatan samideanon. Kio okazis kun li ? Kiu havis kontakton kun s-ro Waldvogel dum la 80aj jaroj (aŭ pli frue - ne estas klare ĉu/kiam li mortis). Cetere, kiu povus rakonti pri f-ino Crisinel kaj s-ro Rosen menciitaj en la biogramo ?

WALDVOGEL Edouard

Nask. ĉ. 1893, mort. ? Protestantulo teologo, ekde 1920 pastoro. 1916-1920 deĵoris kiel eklezia vundit-flegisto i.a. en suda Francio. Aliĝis al la int. civilservo de /v/ P. k E. Cérésolle, kadre de ĝi aktivis en Grizono, Liftensteinjo k Valezo. 1920-32 laboris kiel paroĥestro en Les Eplatures (NE), 1932-38 en Sierre (VS), kiun li forlasis pro ideo konflikto kun kelkaj influaj personoj pri paco k milit-preparado. Transloĝiĝinte al Estavayer-le-Lac (FR), aŭtune 1943 devis okupiĝi pri ĉ. 300 grekaj soldatoj rifuĝintaj el itala kaptiteco. Tie kun sia edzino W. okazigis vesperajn kunvenetojn, kie la grekoj lernis la francan k W. la grekan lingvon k kie helpe de /v/ Hans Jakob W. ankaŭ propagandis por E. Post la 2a MM kun /v/ F. Liechti k /v/ J. Gilliard organizis helpagadon favore al la malsataj germanoj (t.n. Interhela servo). La unuan kontakton kun E W. havis 1905 aŭ 1906 dum aŭ tuj post la 1a UK pere de la patro Samuel W. en la familia somerripezojo Uerikon (ZH) apud la lago de Zürich, 1907/08 W. konscie travivis la Ido-krizon. Ne iĝinte aktiva e-isto, duafoje kontaktiĝis kun E dum la 1a MM en suda Francio, sed

ankoraŭ ne iĝis e-isto. 1927 definitive aliĝis al la E-movado dum la civilservo en Feldis (GR) ricevinte lernolibron de iu franca e-isto. Vintre de 1927-28, loĝante en Les Eplatures, W. vizitis E-kursojn gvidatajn de f-ino Crisinel k s-ro Rosen en La Chaux-de-Fonds (NE) k baldaŭ aliĝis al la loka E-grupo, kies prez. poste mem fariĝis; mem prelegetis, studis la E-historion, 1931 en Solothurn akiris la Superan diplomon, organizis k gvidis vesperkursojn por senlaboruloj k prelegon de Tiberiu Morariu. Pro la UEA-IEL-skismo 1936 W. distanciĝis de la movado, sed konvinkita de /v/ J. Gilliard reaperis en 1944 (verkis 'konfeson de reaperanto'). 1947 gvidis E-lingvan diservon en la katedralo de Bern kadre de la 32a UK predikante pri 'Se mi parolus la lingvojn de homoj k anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbaloj' (1. Kor. 13/13) k kolektante monon por la Interhela servo. Ankaŭ okaze de la 42a UK en Marseille 57 W. gvidis la protestantan diservon. Fariĝinte KELI-membro, W. partoprenis kelkajn KELI-aranĝojn (Rüdlingen SH 1953, Münchenwiler BE 1957, Boldern BE 1965). (SE 10-12 69, 1-5 70, foto SE 12/69)

Andy E. Künzli
redaktoro de la 'Leksikono'

(daŭrigota)